

RAPORTO DE MAZINGIRA de Oktobro 2013 ghis Septembro 2014

Mi dankas al vi chiuj kiuj subtenis al Mazingira en la jaro 2014, kaj mi esperas ke vi subtenos al Mazingira ankaŭ por la jaro 2015.

ELEKTRA ENERGIO:

Feliche ke la ministerio pri energio en Tanzanio konsentis alporti la elektro-energion al miaj vilaghoj kaj jam komencis la laboro pri instalado de elektraj polusoj en kiu la elektro-teknikistoj de la ministerio pri energio kunlaboras en partnereco kun la elektro teknikistoj de la distrikto de Bunda.

MIKROKREDITOJ:

Antaŭ la komenco de tiu projekto virinoj havis problemon de kie ili ricevus la prunt-monon kiun ili povus uzi por starigi kaj daurigi iliajn malgrandajn projektojn, do Mazingira starigis tiun projekton en kiu multaj virinoj en grupoj povis prunti monon de Mazingira kaj jam multaj virinoj nun povas mem konstrui iliajn loghejojn, pagi la lerno-kostojn de siaj infanoj, pagi la kostojn de kuracadoj, aĉeti nutraĵojn por la familio ktp.. Nun venas ideo al Mazingira pri la starigo de la mikrokreditoj ankaŭ por junuloj, havi eblecon prunti monon kiun ili povus uzi por starigi malgrandajn projektojn kiuj ebligas ilin enspezi kaj tion ni faros en la venonta jaro pere de la mono de sunfloro projekto.

BIOGASO:

En ĉi tiu jaro mi ne sukcesis labori pri la biogaso projekto pro manko da mono, tamen mi pli dankas al D-ro Manfred Westermayer kiu subtenis mian partoprenon al biogas-kurso 2013 che la Tanzanio (NMR) "MAVUNO" kiu laboras kun la Germana fonduso de BayWa AG*1. Ĉi jare mi studis che Mkulima Mbunifu.org *2 kiel konstrui malkostan biogaso-metanigujon, kiu kostas ĉirkaŭ 500 Eurojn kaj mi espereble faros tiun provon en Decembro pere de la mono de sunfloro projekto de Mazingira kaj se tio provo sukcesos Mazingira establos en 2015 grandan biogaso-programon en kiu ni kuraghigos la komunumon pri la uzo de biogas-energio por kuirado kaj lumi en siaj domoj kaj samtempe ni konsilos la komunumo halti la tranchado de la arboj kaj bruligado de lignokarbo kiel fonto de kuir-energio

REARBARIGO:

En la jaro 2014 Mazingira disdonis ĉirkaŭ 1000 arbetojn al 4 baza lernejo en kiu ĉiu lernejo ricevis ĉirkaŭ 250 arbetojn de Mazingira kun la kondiĉo ke la arbetoj estu plantitaj sur la tereno de la lernejo ĉirkaŭ la instruistaj loghejoj kaj klasejoj ĉar post kelkaj jaroj tioj arboj povos protekti la lernejo-konstruaĵojn kontraŭ la ventegonj. En Decembro kaj Januaro ni planas kultivi 2000 arbidojn kiujn ni pli disdonos al lernejoj kaj dispensarioj kaj 1000 arbetoj estos por la arbaro de Mazingira.

AGRIKULTURO:

La agrikulturo projekto de Mazingira funkciis ne tiom bone en ĉi tiu jaro kiel ni antaŭe proponis pro diversaj kialoj:

1. Ni malfruis akiri la oleo-premilon.
2. Multaj kultivistoj ne bone konvinkighis al produktado de Sunfloroj kaj pro tio kelkaj vilaganoj ne semis la Sunflorojn kaj ili atendis por vidi la rikolton de alia kiuj semis.
3. Mazingira malfruis ricevi la prunt-monon de la banko por ebligi al Mazingira aĉeti la sunfloro-semojn dum Junio kaj Augusto kaj pro tio venis aliaj firmaoj kiuj aĉetis multajn Sunflorajn semojn de agrikulturistoj.

Malgraŭ tio Mazingira sukcesis kolekti ĝis Augusto ĉirkaŭ 80 tunoj de sunfloraj semoj kaj premis 22000 litrojn da Sunflora oleo kiun ni vendis kaj ricevis profiton de ĉirkaŭ 14 milionoj da ŝilingoj (prok. 7000 euroj).

Mazingira kaj UNDP interkonsentis disvastigi la produktadon de Sunfloroj en nia distrikto kaj pro tio Mazingira kunlaboros kun UNDP kiu baldau subtenos tiun projekton dum 3 jaroj ĝis 2017. Ĉar lau la jam faritaj esploroj estis dirita ke la produktado de Sunfloroj en la distrikto Bunda povus kontribui al la forigo de malricheco je familioj en Bunda distrikto

Bedaurinde Mazingira ne sukcesis trovi la monon por la traktoreto pro tio ni ne sukcesis kultivi la maizo kampon kiel ni proponis en 2014.

OPERACIO DE MISFORMITAJ INFANOJ:

En ĉi tiu jaro ĉirkaŭ 10 misformitaj infanoj - pro vakcinado kontraŭ malario per hihinino - ricevis subtenon de Manfred Westermayer, Ute Haas, Christiane Lamy kaj aliaj, kaj jam sukcesis la operacio de 5 infanoj kaj res-

tas 5 infanoj kiuj baldau iros al hospitalo por la operacio. Tamen pliaj infanoj ankoraŭ atendas subtenon.

PUTO-PROJEKTO:

Loghantoj en la vilaghoj de la vilagharoj Salama kaj Ketare havis tre grandan problemon pri pura akvo ghis la jaro 2008 kiam komencis la puto-projekto kiu celis konstruadon de 47 putoj en la 5 vilaghoj de Salama vilagharo por ke la loghantoj de tiuj vilaghoj havu eblecon ricevi puran akvon en la proksimeco. Do en 2008 Mazingira komencis kunlabori kun la franca asocio Solidareco Afriko-Azio, germana firmao WKV AG kaj aliaj, kiu subtenis la projekton en kiu ghis 2014 ni sukcesis konstrui chiujn proponitajn 47 putojn, kaj pro tio nun la akvo trovighas, sed uzeblas nur por hejma uzo por trinki, lavi kaj kuiri. Ni tre dankas al la subtenantoj.

Sed ankoraŭ restas problemoj pri pura trinkakvo en la vilagho "Tiringati" kiu estis en Nyamuswa vilagharo kiam ni proponis tiun projekton kaj en la jaro 2010 la vilagho translokighis al nova Ketare vilagharo kiu fondiĝis en 2010 kaj pro tio ni petas al la Franca Asocio daurigi la subtenon de putoj ankau al Tiringati. Ni esploris kaj trovis ke eblas konstrui tie 9 novajn putojn, kaj krome almenaŭ 1 malgrandan lageton/basenon en chiu vilagho (7 vilaghoj de Ketare kaj Salama) la akvo en tiaj lagetoj estos por trinkigi bestojn kaj por akvumado en la ghardenoj (la kosto de konstruado de 1 lageto estas chirkau 7000 Euroj).

Mi ankau dankas al la franca asocio kiu subtenis la konstruadon de akvo-rizervejo che la Esperanto Mezlernejo kaj nun la lernantoj kaj instruistoj havas pluvakvon de la lernejo,

ORFOJ PROJEKTO:

La edukado por infanoj plibonighis nun, dank al la subteno farita de Mazingira en kiu la orfoj kaj infanoj de malrichuloj ricevis lerneajn materialojn kiuj bonigis viziti la lernejon.

En chi tiu jaro Mazingira helpis entute 402 orfoj, el kiu 74 orfoj ricevis helpon de subtenantoj el Germanio, Belgio kaj Nederlando kaj 318 orfoj ricevis helpon de subtenantoj el en la norda kaj suda Francio kaj la Franca asocio 'Solidareco Afriko-Azio, che Bruno Robineau, Maryvonne kaj Boris Bouchez

Chi jare multaj infanoj finos la studoj de la baza lernejo kaj mi esperas ke ili alighos al Esperanto mezlernejo do mi petas vin daurigi vian subtenon.

En Januaro kaj Februaro Mazingira proponas starigi novan retpaghon kiu enhavos chiujn informojn pri la agado de Mazingira kaj eblos al chiu subtenanto trovi la informon de la helponta infano, la foto de la infano kaj aliajn informojn kiuj rilatas al la koncerna infano.

RADIO PROJEKTO:

Tre bone progresas la radio projekto, en chi tiu jaro Mazingira ricevis sufiche bonan subtenon de UNDP kiu ebligis la radio-stacio translokighi de mia vilagho al Bunda urbo kaj ankau ni povis aĉeti multajn ilojn por la radio kaj nun radio elsendas la programojn dum 24 horoj tage kaj la elsendoj atingas al niaj foraj auskultantoj kun bona kvalito. UNDP daŭre subtenos la radion Mazingira kaj agrikulturo projekto de Mazingira dum 3 jaroj ghis 2017.

LERNEJO PROJEKTO:

La konstruado de lernejo daŭris bone en chi tiu jaro kaj ni multe okupighis pri la Adiministro konstruajho kaj la instruista loghejo. Mi esperas ke vi daŭre subtenos la projekton ĉar ghis nun ni bezonas subtenon por la fenestroj kaj pordoj de la lastaj 3 klasejoj, la adiministro konstruajho, kaj por la biblioteko kaj laboratorio.

ESPERANTO-KURSO PROJEKTO:

Mi dankas al la fonduso Esperanto-plus kiu subtenis la instruadon de la Esperanto lingvo che Esperanto mezlernejo dum chi tiu jaro. Mi povis instrui al chirkau 180 lernantoj kiuj tre bone progresas kaj mi esperas ke venos multaj novaj lernantoj en 2015.

Mramba Simba, la 12-a de Oktobro 2014

*1) www.baywastiftung.de/projekte/afrika-und-asien/biogas-tansania

*2) www.mkulimambunifu.org/?p=927

MAZINGIRA, P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO

Retadreso: smbmramba@yahoo.com, mazingiratz@gmail.com

Retpaĝoj: www.kono.be/mazingira, <http://www.verduloj.org/mazingira.htm>